



N-ro 1 - 2006.07.29

Florenca Lilio

KURIERO DE LA 91A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Bonvenon!

Post 51 jaroj dum kiuj ĝi trairis ĉiujn kontinentojn, la mirinda evento de la UK denove okazas en Italio. La itala movado fieras gastigi la tutmondajn esperantistojn, kaj bondeziras al ili tutagrablan kongresumadon.

Prelude al la U.K. okazis altnivela studotago pri elstara lingvisto-esperantisto

MIGLIORINI HONORATA EN LA UNIVERSITATO DE FLORENCO


Florenco, 28an de julio. Okazis hodiaŭ ĉe la Fakultato pri beletro de la Universitato de Florenco la studoago memore pri Bruno Migliorini: “voj de interlingvistiko: ekde Bruno Migliorini ĝis hodiaŭ”, enkonduka evento por la 91a UK.

La studotagon aranĝis la Akademio de Esperanto, la Akademio della Crusca, la Universitato de Florenco kaj Akademio Internacia de la Sciencoj Sanmarino.

Post la enkondukaj vortoj de Francesco Sabatini (la prezidanto de la Akademio de la Crusca), intervenis profesoroj Carlo Minnaja (Universitato de Padova, IT), Fabrizio Pennacchietti (Universitato de Torino, IT), Humphrey Tonkin (Universitato de Hartford, US), Geraldo Mattos (Universitato Uniandrade, BR), Mukunda Phatik (Universitato de Katmandu, Nepalo), Aleksander Melnikov (Akademio pri Agrikultura Mekaniko de Rostov, RUS), Mauro La Torre (3a Universitato de Romo, IT), Giordano Formizzi (Universitato de Verono, IT), Amri Wandel (Hebrea Universitato de Jerusalemo, IS) kaj Renato Corsetti (Universitato La Sapienza de Romo, IT); oni krome prezentis la studojn de Tullio De Mauro (Universitato La Sapienza de Romo, IT) pri “Migliorini homo, lingvisto kaj esperantisto” kaj Nico Sica (Universitato Bicocca de Milano, IT) pri interlingvistika planado.

Partoprenis en la kolokvo ankaŭ Paolo Migliorini, filo de la fama lingvisto kaj esperantisto, kiu trajtis la figuron de sia patro, memorigante interalie la fakton, ke lia eniro en la universitatan mondon koincidis kun la foiriro el la esperantista medio. Sed Paŭlo mem povis malkovri detalojn, kiujn li ne konis: ekzemple, li eksciis informojn pri la korespondado de sia patro

kun Giuseppe Peano, fama matematikisto, kiu – aldone al aksiomoj pri naturaj numeroj – kreis lingvon “Latino sine flexione” (ĝi estas simpligita latina lingvo – projekto de internacia lingvo).



La ĉeestantaro aparte interesiĝis pri la ĵurnaloj montritaj de prof-ro Minnaja kiuj atestas pri la rapideco per kiu la 16-jaraĝa Migliorini ellernis Esperanton: la 14an de januaro 1913 li vizitis sian unuan prelegon pri Esperanto kaj nur 10 tagojn poste oni informis en la itala E-revuo, ke li instruis Esperanton.

Fine de la kolokvo, prof-ro Giordano Formizzi levis elkoran alvokon favore al la instruo de Esperanto en la lernejoj, lingvo facila kaj neŭtrala kompare kun la kultura kolonizado de la angla.

SALONO ZAMENHOF

la ejo de la inaŭguro

DIMANĈE LA 30an de JULIO

10a horo

troviĝas ĉe

la strato malantaŭ la Kongresejo

Bonvolu ĉirkaŭi la dom-blokon

por atingi ĝin.

Malmultaj scias, ke la **infanaj kongresetoj**, unu el la plej amataj tradiciaj eroj de la UK-oj, naskiĝis precize antaŭ duona jarcento, en Kopenhago en 1956, kaj festas nun sian oran jubileon. **Giancarlo Fighiera**, kiu lanĉis la iniciaton, raportas pri ĝia komenco kaj pluevoluoj.

50 JAROJ DA JUNEKO: LA INFANA KONGRESETO JUBILEAS (1956-2006)

La nun duonjarcentaj Internaciaj Infanaj Kongresetoj (IIK) naskiĝis en Kopenhago en 1956, okaze de la 41-a Universala Kongreso de Esperanto (UK) danke al kunfluo de kelkaj favoraj cirkonstancoj.

Ek de la komenco la kongresprepara periodo, loka entuziasma esperantistino, kiu direktis infanĝardenon en apuda urbeto, Karen Bjørnsby, petis min, tiam Konstanta Kongresa Sekretario (KKS), instrui Esperanton al la de ŝi prizorgataj infanoj; en tiu momento mi hazarde eksciis, ke la samjara SAT-kongreso anoncis “geknaban kongreseton”. El tiuj du supraj elementoj fontis ĉe mi la ideo kunigi niajn UK-etulojn inter 6 kaj 13 jaroj konantajn Esperanton en propra kunestado, nomita IIK. La aranĝo estis elpensita simple kiel plia tiujara kongresa programo.

De 1956 ĝis hodiaŭ la IIK ripetigis ĉiujare, kun okfoja escepto, grandparte en neeŭropaj landoj: Tokio, Roterdamo, Portlando, Ateno, Rejkjavik, Pekino, Kubo, Seulo.

La unua IIK okazis apud Kopenhago (Hellerup) en la infanĝardeno de Karen Bjørnsby, kiu prizorgis dekkvinon da IIK-partoprenantoj. En la sekvantaj jaroj la infanojn gastigis lernejoj, kulturdomoj, ĉemara fericentro, skolta arbara vilaĝo, loĝkolonio, domo de la Ruĝa Kruco (Stokholmo), junulargastejo: plejofte for de la kongresa urbo en natura cirkaŭaĵo.

En la postaj IIK la baza infana aĝo restis sensanĝa, escepte ol en 1971, kiam oni eksperimentis novan grupon por 14-16-jaruloj. La provo malsukcesis, ĉar la pliaĝuloj bezonus apartajn

ejojn kaj programon. Restis tra la jaroj ankaŭ la kutimo peti la gepatrojn skribi konfirmi sufiĉan bazan lingvokonon de siaj gefiloj. Ja, la nivelo de la lingvokono montriĝis daŭre unu el la ĉefaj demandoj de la IIK, kiu ne celas funkcii kiel multlingva infanvartejo, sed volas krei unikan okazon, en kiu diverslingvaj infanoj komunikas inter si en komuna lingvo.

Por mildigi financajn malfacilaĵojn, naskiĝis sinsekve la kategorio “Adoptaj Gepatroj” kaj la kongreseta donac-kaso, kiuj intencis kovri la vetur- kaj restad-kostojn de infanoj el nepagipovaj familioj. La kotizo de la IIK evoluis dum la tempo: eĉ konsiderante la inflacion kaj la malvalorigo de kelkaj devizoj, ŝajnas, ke en iuj periodoj la kotizo nenormale galopis.

La nombro de registritaj infanoj multe variis de jaro aŭ jaro, ankaŭ depende de la partopren-kvoto el la kongres- kaj najbaraj landoj. La minimumo okazis en Marseille (14 infanoj), la maksimumo en Budapeŝto (88). Same, la reprezentitaj landoj altalenis de 4 (Marsejlo) ĝis 23 (Ausburgo). Rimarkinda estas la sindediĉo de la gvidantoj kaj helpantoj (en Londono eĉ 14) de la aranĝoj: kelkfoje temis pri tuta stabo da diverslandaj profesiaj edukistoj Karen Bjørnsby (Danlando) deĵoris dum la du UK en Kopenhago, Willi Brandenburg (Germanio) gvidis du IIK-ojn: la rekordo apartenas al Ch. Fettes (Irlando) kaj al la edzino Helen Fantom, kiuj prizorgis almenaŭ kvar kongresetojn.

Pri la jubilea nunjare en Florenco okazanta Infana Kongreseto, kiu arigas tridekon da etuloj, respondecas Bert Schuman (Francio) kaj Leonardo Pampaloni (Italio).

Ĝisdate pri la programo:

LA UNUAJ DU TAGOJ DE LA INFANA KONGRESETO 2006 - DIMANĈE oni vizitos bestojn en Centro pri Naturaj Sciencoj, poste oni desegnos pri naturo kaj ekologio. Kimie Markarian gvidos kurson pri Sorobano (japana abako). **LUNDE:** la Infankongreseto vizitos Florencon. Trajno el Prato alvenos je 9h52 aŭ 10h21. Por renkonti kaj akompani ilin, atendu de 10a ĝis 10h30 en stacidomo antaŭ apoteko (“farmacia”). En Palaco Vecchio skabeno akceptos la infanojn. En parko ni piknikos. Ĉirkaŭ 16a ĝis 18a horo ni estos en UKejo por renkonti niajn gepatrojn.



Aŭtoraj duonhoraj (v. KL paĝo 42)

sabate la 29an de julio

16.00 -17.00 -Italaj tradukintoj de ĵus aperintaj verkoj (Carlo Minnaja, Johano-Karlo Rinaldo, kaj eble aliaj)

dimanĉe la 30an de julio

15.30 -16.00 Humphrey Tonkin pri la traduko de *La vintra fabelo*
16.00 -16.30 Peter Balasz, filmo pri *Vizito al la Centra Oficejo*

lunde la 31an de julio

10.30 -11.00 Amri Wandel: *la nova IKU-libro* - **16.00 -16.30** Tomasz Chmielik: *La Alia Venecio*, kaj aliaj tradukoj aŭ verkoj - **16.30 -17.00** Anna Maria dall’Olio: *Tabelo*

marde la 1an de aŭgusto

10.30 -11.00 Andreas Kunzli: *Svisa Enciklopedio Planlingva*
11.00 -11.30 Miguel Gutiérrez Aduriz: *Sferoj*
16.00 -16.30 Spomenka Stimec: *Hodler en Mostar*
16.30 -17.00 Josip Pleadin: *Ordeno de verda plumo*

ĵaŭde la 3an de aŭgusto

10.30 -11.00 Paul Gubbins: novaj teatraĵoj prezentataj dum la UK
11.00 -11.30 Peter Balasz: DVD *Esperanto Elektronike*
16.30 -17.30 “Japana horo”, kiam japanaj aŭtoroj renkontas sian publikon: **16.30 -17.00** Sibayama Zyun’iti (kaj aliaj): *Esperanto-Japana Vortaro* - **17.00 -17.30** Hori Jasuo: *Raportoj el Japanio*

vendrede la 4an de aŭgusto

10.30 -11.00 Bertil Wennergren: *Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko*

16.30 -17.00 Carlo Minnaja, Anatolo Ŝejpak: *Populare pri historio de la sciencoj kaj teknikoj*

17.00 -17.30 Karen Pereira kaj Joe Bazilio: filmo pri *Gerda malaperis*

ŜANĜOJ

La prelego de Andreas Kuenzli pri Zamenhof kaj la 2a UK ne okazos dimanĉon, la 30an de julio, sed **vendredon, la 4an de aŭgusto**, je 9h00 ĝis 10h30 en salono Minnaja.

La jarkunveno de la Internacia Naturkuraca Asocio (INA) okazos **dimanĉon, la 30an de julio**, je 13h00 ĝis 13h45 en salono Minnaja.

La kunsido de la ELEKTA KOMISIONO (**lundon, la 31an de julio, je 16h30** en salono Marignon). estos **PUBLIKA**. Jen Via ŝanco esprimi Viajn opiniojn pri la dezirinda kunmeto de la Estraro, elektota en 2007.

Survoje al la Kongreso



La ambasadoro de Italio en Litovio, Giulio Prigioni, membro de la honora komitato de nia Kongreso, akceptis la 12an de julio ĉiujn litovajn delegitojn de la 91a UK, per regalo en la nova sidejo de la itala ambasadejo en Vilnius.

El la 57 litovaj samideanoj kiuj aliĝis al la florenca UK, pli ol 40 el la tuta lando partoprenis en la renkontiĝo, dum kiu ĉeestis ankaŭ la ambasadorino de Belgio.

La itala ambasadoro salutis siajn gastojn per paroladeto en perfekta Esperanto: “Ĉiam estas afable por mi akcepti en tiu ĉi nova eta anguleto de Italio en Vilnius delegacion de esperantistoj, kiuj baldaŭ veturos al Universala kongreso en Florenco. Kiel mi jam esprimis en mia parolo pasintjare, mi forte estimas tiujn, kiuj sinofere tamen kun granda entuziasmo komencis lerni komunan por ĉiuj popoloj lingvon en la spirito de frateco kaj reciproka kompreniĝo. Esperanto estas viva lingvo, kies kono devas disvastiĝi, ĉar ĝi estas sola lingvo, komuna por ĉiuj kulturoj. Mi estas certa, ke en

Florenco via entuziasmo spertos novan impulson. Florenco estas urbo, kiu ĉiam, sed aparte dum Renesanca periodo, estis kultura centro de la homaro. Kulturo disvastiĝas kaj fortiĝas nur tiam, kiam ĝi reprezentas laŭeble la plej multajn diversajn popolkulturojn kaj uzas komunan kaj por ĉiuj facile kompreneblan kaj akcepteblan lingvon. Ankaŭ hodiaŭ Florenco prezentas triumfon de klasika beleco kaj laŭdas specifecon de nova lingvo, kiu ĝin resumas. Mi estas certa, ke en Florenco vi, karaj geamikoj, sentos vin kvazaŭ hejme, en Litovio, kaj scipovos dece pritaksi kaj helpas al aliaj pritaksi tiun kulturon, kiun litovoj kaj italoj devigis sin defendi en la mondo. Mi sincere deziras bonan vojaĝon por vi. Fruktonon laboron kaj afablan restadon en Florenco. Povilas Jegorovas, prezidanto de LEA, donacis al la ambasadoro du librojn tradukitajn en la itala kaj eldonitajn de la ŝtata presejo Spindulus: ‘La danĝera lingvo’ de Ulrich Lins kaj ‘La nova realismo’ de Bruno Vogelmann.

La kongresa simbolo



La vizaĝo de Davido, kiel ĝin skulptis Mikelaĝelo, estas la bildo elektita por la “logoo” de la 91a UK. Jen malgranda historio de la statuo.

Mikelaĝelo (itale : Michelangelo Buonarroti [mi-kel-án-ĝe-lo būon-ar-ro-ti], 6a de marto 1475 - 18a de februaro 1564), estis itala renesanca skulptisto, pentristo, arkitekto kaj poeto. Per lia verkaro kulminis la renesanco kaj komenciĝis la baroko. Li devenis el Florenco, sed multajn verkojn kreis en Romo servante al pluraj papoj.

Lia statuo de Davido, estas taksata ĉefverko de la renesanca skulptarto (iuj artistoj kaj arthistoriistoj eĉ diras, ke ĝi estas la plej bela artaĵo iam farita de homo). La statuo montras Davido’n momenton antaŭ ol ataki Goljato’n (la rakonto estas en la Biblio, unua libro de

Samuelo, ĉapitro 17).

La statuo - alta 5,17 metrojn - havas interesan historion. Jam de pli ol 40 jaroj granda marmora peco estis je dispono: kelkaj artistoj provis realigi per ĝi statuon sed sensukcese, kaj la marmoro sekve prezentis la signojn de la pluraj eksperimentoj (i.a. granda fendoj); plie, oni taksis, ke la ŝtono estis tro malkompakta kaj ke sekve la statuo-kruroj ne povus elteni la pezon de la tutaĵo. La marmoraĵo restis do forgesita dum jaroj en malfermita spaco, korodita de la tempopaso ĝis kiam, en 1501, Mikelaĝelo akceptis la “defion” realigi per ĝi la Davido’n. Lia laboro finiĝis tri jarojn poste, en 1504: por transporti la kolosan statuon necesis 4 tagoj, kaj dum la transporto ĝi estis ŝtonumita de ribeluloj (Mikelaĝelo surloke prizorgis tuj la forigon de la batsignoj). Dum la tumultoj de 1527 la statuo estis denove grave damaĝita: la maldekstra brako estis rompita en tri pecojn kaj la ŝtonĵetilo estis difektita: ankoraŭ hodiaŭ oni povas konstati la signojn de tiu evento. Dum la jarcentoj, la statuo suferis aliajn damaĝojn pro atakoj, meteorologiaj kondiĉoj kaj (nekredeble sed vere) ankaŭ pro malbona restaŭrado. En 1872 oni decidis transporti ĝin el la placo sub tegmenton, en la Galerio de la Akademio. Tiu en placo della Signoria estas kopio.

Reduktitaj prezoj en la komunumaj muzeoj de Florenco

Oni proponas al vi viziton al la muzeoj kaj partoprenon en la aktivecoj “Emocioj de muzeo” je favora tarifo se vi montras ĉe la kaso vian kongresan insignon.

Palazzo Vecchio – Monumentaj kvartaloj – PIAZZA DELLA SIGNORIA

Horaro: Ĉiutage 09.00 – 19.00 escepte de ĵaŭdo (09.00 – 14.00)

Unupersona bileto kiu validas por vizito al la monumentaj kvartaloj aŭ por la partopreno en unu el la aktivecoj “Emocioj de muzeo”: **EUR 2,00** - Vizito kaj unu aktiveco: **EUR 3,00**

La aktivecoj okazas ankaŭ en la angla kaj, laŭ mendo, en la franca kaj la hispana.

Cappella Brancacci in Santa Maria del Carmine – PIAZZA DEL CARMINE (preter la rivero)

Horaro: Ĉiutage 10.00 – 17.00 escepte de dimanĉo (13.00 – 17.00) kaj mardo (fermita)

Unupersona bileto por vizito al la Kapelo kaj spektado de la videodiska filmo “L’occhio di Masaccio” (“La okulo de Masaccio”): **EUR 1,50**

Muzeo kaj monumentaj klostroj di Santa Maria Novella – PIAZZA SANTA MARIA NOVELLA

Horaro: Ĉiutage 09.00 – 17.00 escepte de vendredo kaj dimanĉo (fermita)

Unupersona bileto: **EUR 1,00**

Informoj kaj antaŭmendoj. Por Cappella Brancacci kaj la aktivecoj “Emocioj en muzeo” en Palazzo Vecchio antaŭmendo estas deviga kaj senpaga. Oni povas tion fari ĉiutage 09.00 – 13.00 kaj 14.00 – 18.00 en la komunika centro en Palazzo Vecchio aŭ telefone al 055-2768224 / 2768558.

utilaj informoj

LA VOLONTULOJ JE VIA DISPONO, KUN BLUA INSIGNO...

Pli ol 80 sinoferemaj volontuloj de la 91a UK estas je dispono de la kongresanoj. Ili klopodos helpi laŭ siaj eblecoj, por solvi etajn kaj "malpli etajn" problemojn, kiujn povus alfronti la gekongresanojn.

Fronte al ilia alta sindonemo, sinoferemo (kiu estas honoro por ni ĉiuj) ni certas, ke la kongresanoj konscios, ke oni ne povas peti helpo de ili, kiu superu iliajn forton, kapablon kaj ankaŭ ... paciencon.

Vi rekonos ilin per ilia ĝentileco kaj per la blu-kolora rubando kiun ili havas ĉirkaŭ la kolo.

... KAJ LA KONGRESANOJ ĈIAM HAVU KUN SI LA KONGRESAN INSIGNON

Por eniri la kongresejon necesas, ke oni prezentu sian kongresan insignon. Memoru, ke oni devas prezenti ankaŭ dum aliaj okazoj (ekzemple, je la eniro en Baziliko de sankta Laŭrenco, por la ekumena Diservo, dimanĉe la 30an de julio, h. 16.00)

Poŝtaj tarifoj. La *aŭfranko por sendi bildkarton aŭ leteron (ĝis 20 gramoj) kostas:*

0,65 eŭrojn al Eŭropo kaj al landoj de la mediteranea baseno: Alĝerio, Cipro, Egiptio, Jordanio, Izraelo, Libio, Libano, Maroko (Ifni, Dakia, Layoune, Semara), Sirio kaj Tunizio;

0,85 eŭrojn al la aliaj landoj de Afriko kaj Azio, al Amerikoj;

1,00 eŭron al Oceanio.

Ĉiuj sendaĵoj vojaĝas per prioritata poŝto (ne ekzistas ekonomia aŭ "marpoŝta" tarifo).

Poŝtmarkojn vendas, krom poŝtoŝtancoj, ankaŭ kelkaj tabakvendejoj kiuj havas la eksteran indikon: "valori bollati".

Ĉu Vi deziras konsilon por elekti kie manĝi dum la kongreso rapide, komforte, bonkvalite sed ĉefe sen bankroti? Aĉetu ĉe la ĝiĉetoj - kontraŭ pura elspezrepago - la utilan broŝuron "Florenc' en buŝo... kaj ne nur".

EKSKURSOJ - GRAVEGA SCIIGO

Pro organizaj kialoj la forirhoroj de la duontaga ekskursoj, indikitaj en la biletoj, estas MALĜUSTAJ.

Bonvolu legi sur la anonc-tabulo la precizajn indikojn.

EKSKURSA SERVO – Flavia Dal Zilio

lastaj aliĝoj

- | | | |
|------|--------|--|
| 2106 | suzr-q | S-ino Suzanne O' Riain-Hug , privata adreso, Bruxelles, Belgio |
| 2107 | itau-u | S-ino Ina Tautorat , Am Rundling 8, DE-12487 Berlin, Germanio |
| 2108 | swyn-i | S-ino Jan Swynnoe-Tubb , Suff Lodge, Bishopswood Ross-on-Wye, Herefordshire, Britio HR9 5RA |
| 2109 | dpch-v | S-ino Anne-Marie Dupéchaud , 104 ave. Leclerc, FR-59130 Lambersart, Francio |
| 2110 | cwik-p | S-ro Michael Cwik , Sijsjeslaan 22, BE-3080 Tervuren-Moorsel, Belgio |
| 2111 | evan-l | S-ro Eduardo Vargas Gutiérrez (Solo) , Ayala 3 4º D, ES-29002 Málaga, Hispanio |
| 2112 | msuj-q | S-ro Maurice Sujet , 6 rue Porte d'en Haut, FR-77320 Jouy-sur-Morin, Francio |
| 2113 | rnka-c | S-ino Ranka Mraković , Schrottova 35, HR-10000 Zagreb, Kroatio |
| 2114 | zrss-i | S-ro Savalan Zereshkian , Tabage sewom shargi, Bluke 5, Faz 6, Shahrak Daneshgah 13899937117, Irano |
| 2115 | robo-r | S-ro Romano Bolognesi , Via Misa 4, IT-40139 Bologna, Italio |

La IKU-LIBRO estas aĉetebla en la libroservo

Por kontakti la redakcion:


- Vi povas VENI al la Gazetara Servo, en Salono Fighiera-Sikorska, teretaĝe, en la kongresejo;
- aŭ Vi povas SENDI retpoŝtan mesaĝon al adreso: <kontakto-lilion@yahoo.com>
- aŭ Vi povas TELEFONI al itala poŝ-telefono: (+39) 338 860 20 84. Al ĝi Vi povas sendi ankaŭ SMS'n.

ĉu parencoj?

Abdallah, reĝo de Jordanio



Clay Magalhaes, KKS de Uea



(...daŭrigota)